

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

L'ESPERANTO CAMINA...

A Barcelona funcionen 20 cursos d'esperanto amb un nombre d'assistents que passa dels 500 !

Hi ha una manera indirecta de protegir a la
Federació Esperantista Catalana:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

Zamenhof-disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.^e Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a _____

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

EL XXIVè CONGRES UNIVERSAL D'ESPERANTO

UNA LLENGUA AUXILIAR PER A LA CIENCIA

La guerra darrera va liquidar l'imperialisme en principi. Els tsars, els kàisers, els emperadors i gairebé els reis no semblen sinó trofeus històrics. Ni tot el profund sentit polític anglès no pot evitar que es desfaci l'imperi britànic, el darrer imperi polític de la nostra civilització.

El seguiment imperialista de la nostra era s'ha concentrat en l'estatisme. Aquest ha esdevingut el baluard més fort de la vella política. Representa l'esforç suprem contra la virada imminent i definitiva de la política moderna, de la nova ideologia que la guerra ha imposat en principi, i totes les dictadures de la postguerra no són més que les revifalles i les extremituds de la tendència imperialista que ha sobreviscut a la Revolució Francesa. Aquesta imposà la igualtat, la llibertat i la fraternitat dels pobles, la justícia de les nacions davant la llei. Avui no hi ha races ni castes senyores i races i castes esclaves políticament a Europa, ni a tot el món sortit de la nostra civilització; però hi ha cultures, llengües, nacions, com a formes diferencials de la humanitat que triomfen o clamen per l'imperi de l'equitat davant la política. L'Esperanto representa la plasmació genial de solució justa, lògica i total en el problema de les llengües, que és el punt neuràlgic i la pell de l'ànima de les nacions i de les cultures.

La declaració d'esperantisme feta en el primer Congrés Universal, que justament s'escaigui també a França, a Boulogne-sur-Mer, l'any 1905, deia que l'Esperanto neutral internacional era la llengua a emprar, com a auxiliar, per a evitar conflictes en aquells

països on diverses nacions es disputen per diferències d'idiomes. *Diferents nacions en alguns països, diferents idiomes en alguns països.* Zamenhof, l'autor de l'Esperanto, era súbdit rus, de nació polonesa, de raça jueva; sabia, doncs, ben bé el que es deia en aquest punt. L'aspiració moderna dels jueus és d'esdevenir una nació, una llengua, una cultura: la manifestació moderna de les facetes humanes no és la raça ni la casta.

* * *

Malgrat d'aquesta declaració, malgrat de la idea interna de fons pacifista que anima l'Esperanto, malgrat que tots els esperantistes declaren llur pacifisme, i llur fraternalisme, i llur igualitarisme lingüístic i nacional, puix que tots volen ésser els millors deixebles de Zamenhof, en arribar l'hora dels fets i de les proves, dins l'organització mateixa del moviment esperantista sorgeixen dos partits: el dels qui poden sentir com Zamenhof i el dels qui no poden: el partit esperantista dels qui han sofert o sofreixen injustícia lingüística, cultural, nacional, i el partit dels qui no poden sentir el clam de justícia. Per als primers l'Esperanto és una causa redemptora d'avantatges materials, de facilitacions pacifistes, i, sobretot, de llibertat i de justícia; són esperantistes integrals. Per als naturals de llengües, nacions, i cultures senyores, privilegiades, l'Esperanto, l'esperantisme, és una causa de progrés i de pacifisme—i no els neguèssiu pas que la senten!,—però no pas una causa de llibertat i de justícia com per als qui anhelan la igualtat, la justícia i la llibertat nacional, cultural i lingüística, perquè en patim sed i fam, perquè en vivim en règim de postergació, com hi vivia el polonès autor de l'Esperanto.

* * *

Ningú no vol ésser menys sensible que els altres companys de causa. No podeu pas dir als francesos, ni als anglesos, ni als castellans esperantistes que ells són menys esperantistes, o bé que senten l'esperantisme menys profundament que els catalans, o que els flamencs. La teoria és igualment lògica i clara per als uns com per als altres. El liberalisme, la democràcia, la justícia, en teoria, en principis, ¿qui podrà dir a Maunel Azaña, per exemple, que no els veu tan clarament com Amadeu Hurtado? Ja veieu que cito dos casos, dos subjectes de gran ponderació. I bé: proposeu-los l'aplicació del liberalisme lingüístic a Catalunya, i constatareu que el castellà veu que els catalans són una minoria, i Hurtado veu que són una majoria. I això que aquest no cedirà pas en patriotisme a aquell. No hi ha sinó que l'un sent des d'una posició, i l'altre sent des d'una altra posició. Des de la posició

catalana no es pot ésser sinó fidel o renegat respecte a Catalunya; des de la posició castellana no es pot ésser tolerant o intolerant respecte al català a Catalunya. El fet és que, prenent per base el liberalisme, castellans i catalans han d'arribar a un punt subjectiu irreductible a l'hora dels fets o de les proves. Es el cas entre Briand, francès, sense minoria francesa preterida, i Stresseman, alemany, amb minories alemanyes preterides. Briand pugnava per una justícia, per una pau entre Estats. Stresseman anhelava una justícia, una pau entre nacions. Tots dos eren pacifistes. Però la posició subjéctiva, nacional, lingüística, cultural, entre l'un i l'altre eren diferents. Són les dues posicions subjéctives que sense prèvia declaració es dibuixen en el moviment esperantista universal. L'Esperanto, la solució lingüística, és, però, solució meravellosa tant per als uns com per als altres. Els filòlegs de tot el món que es precipitaren a dictaminar sobre l'Esperanto a base de prejudicis van errar-la. El fet lingüístic desfà una pila de prejudicis i s'imposa com tantes solucions que l'home tècnic, fent de profeta, havia jutjat utòpiques. Es clar que aludim els tècnics falsos, mecànics, lleugers, com tants eminents ignorants de l'Esperanto que se n'han rigut.

INTERNACIA KONFERENCO DE MINORITANOJ

Kiuj interesigas?

Post prelego okazigita dum de la 1.^a Internacia Lingva Konferenco en la Esperanto-Domo de la Cseh-Instituto, kelkaj ĉeestintoj je tiu prelego eldiris penson ke povus vere sukcesi Internacia Konferenco de Minoritanoj, kiu pridiskutus lingvajn, kulturajn, jurajn kaj aliajn problemojn ĉe minoritoj kaj popoloj renaskigantaj el subpremadoj kaj jugoj ĉiuspecaj.

Estus tre interese, efektive, la okazigo de tia Konferenco, kiu havus ĉefe kulturan celon: solvon de kulturaj problemoj, kaj kiun ĉeestus esperantistaj minoritanoj montrantaj ke ili ne devas honti pro uzo de lingvo kies altrudon ili celas eviti, sed ke Esperanto praktike kaj juste solvas la interlingvan problemon.

La Fandraj amikoj jam anoncis ke ili deziras kunlavori al tia Konferenco.—Kiuj aliaj interesigas?

Bonvolu ne nur anonci vin pretaj, sed eldiru vian opinion pri programo kaj organizo ĉu pere de Esperanta gazeto, ĉu rekte al la subskribinto.

Delfí DALMAU.

strato València, 245. BARCELONA (Katalunujo).

UNUAJ PAŜOJ DE ESPERANTO EN KATALUNUJO

(Fino)

Iom post iom, en Barcelona pligrandiĝis la entuziasmo; diversokaze estis prezentataj esperantistaj festoj en la Teatro Bosque; oftaj amikrondoj ĉe Bar "Esperanto" de la strato Conde del Asalto, ĉe Kafejo "Universidad" kaj en "Amika rondo" ĉe kafejo "Paris". La unuaj esperantistoj rimarkindaj pro sia aktiveco estis S-roj. Pujulà, Sabadell, M. Cases, doktoroj Bremon kaj Pallejà, S-roj. Rosals, Baucells, Pellicer, el Barcelona, kaj S-ro. Cerdà, el Sabadell, kaj aliaj. Aperis "Fulmo", "Tutmonda Sonorilo", kaj en Igualada, "Stelo Kataluna". Ankaŭ, en la jaro 1908, aperis "Tutmonda Espero", revuo eldonita de la societo Espero Kataluna, el Barcelona.

Oni eldonis, en Barcelono, dum la jaro 1909: "Manual y ejercicios de Esperanto" de ŝtata kapitano V. Inglada Ors. "Gramatiko kaj Vortaro" de D-ro. Bremon i Masgrau. "Clau Esperanto" (Kataluna Ŝlosilo) eldonita de Tobella i Costa. "Unu Fojon..." de M. Cases. "Mistero de Doloro" kaj "Don Kihoto de la Manĉo", pecoj tradukitaj de S-ro. Pujulà. Aperis la ĉiusemajna gazeto "Kataluna Nacio" kaj la revuo "Jen".

En Vilasar de Mar, oni eldonis "Programa de Esperanto" de F. B. Albiñana.

Estis elektataj "Lingvo-Komitatanoj" S-roj. Pujulà kaj D-ro. Bremon. S-ro. Tudó kreis "La Rondo", kataluna esperantista balo kiu estis dancata, unuafoje, de "Esbart Català de Dansaires" en la teatro Niu Guerrer. En 1909, oni festis la datrevenon de l'unua libro de Esperanto, organizita de 25 esperantistaj grupoj de Barcelona.

S-ro. Bourlet kaj Barono de Ménil, aŭtoro de l'Himno Esperantista, vizitis Barcelonon; je ilia honoro oni okazigis diversajn esperantemajn solenaĵojn.

La eksreĝo de Hispanujo akceptis la Honoran Prezidantecon de la 5.^a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelona. Estis vendataj produktaĵoj anoncitaj per Esperanto: "Poluro Esperanto", "Limonado Stelo", "Lesivo de Esperanto", kaj aliaj.

De la 6.^a ĝis la 11.^a tagoj de Septembro de 1909 okazis solene kaj entuziasme la Kvina Universala Kongreso de Esperanto, kaj la Unuaj Internaciaj Floraj Ludoj de Esperanto, en la urbo de Barcelona.

La Hispana eksreĝo oferis la honoran titolon de Komandoro de la Ordeno de "Isabel la Katólita" al D-ro. Zamenhof. Ĉe S-ro. Sabadell, estis reproduktita per vaksa cilindro (aparato Pathé) la voĉon de nia Majstro per liaj deklamoj "La Espero" kaj "Dankparoladeto".

En Januaro de la jaro 1910, aperis la revuo "Kataluna Esperan-

tisto", organo de Kataluna Esperantista Federacio; ĝi estis eldonita en Barcelona kaj la redakcio en Sabadell.

Aperigis la revuon "Semo" la grupo Paco kaj Amo. S-ro. Sabadell tradukis el verkoj de Rusiñol: "Folioj de la Vivo", "Ĉiama Kantaĵo" kaj "Unua letero". S-ro. M. Cases verkis "Mistera Krime" kaj la bonhumoran komedieton "Vivu Esperanto".

Oni okazigis longtempe la popularajn "Esperantistaj Vendredoj" ĉe Ateneu Enciclopèdic Popular. Estis fondita "Gerona Provinca Ligo".

La 27an de Julio kaj la 4an de Januaro 1912, per la Hispana nacia Gazeto, oni dekretis regajn ordonojn, permesante la lernadon de Esperanto ĉe ĉiuj lernejoj kaj Universitatoj de Hispanujo.

Manuel RODELLAR

Prezidanto de la grupo "Barcelona Esperantisto"

LLISTA DELS "AMICS DE KATALUNA ESPERANTISTO"

Enric Adam.
S. Alberich Jofré.
Josep Alberich.
Valentí Alavedra.
Jacint Bremon.
Eduard Capdevila.
Josep Casanovas.
Ramon Cirera.

Antoni Codorniu.
Jacint Comella.
Delfí Dalmau.
J. Font Giralt.
Jaume Grau Casas.
Maurici Orriols.
Marian Solà.
R. Torras Carreres.

XVI-a KONGRESO DE K. E. F. KAJ XV-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ EN LA URBO VENDRELL

Pentekosto de 1933

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

VI. Premio de "Universala Esperanto-Asocio". Unu bela esperanta horloĝo por sinjoroj. Temo. Laŭvola.

VII. Premio de Sro. Pau Casals. Artobjekto. Temo: Laŭvola.

Du rimarkoj pri tiuj du lastaj premioj. La unua donacinto sendos sian premion rekte al la gajninto. La dua donacinto, Sro. Pau Casals, la mondkonata violonĉelkoncertisto, krom la menciita premio, ankaŭ donacos la *naturan floron* al la poetgajninto.

Al la partoprenontoj de tiu literatura festo. La esperantistoj, kiuj deziras partopreni la Florajn Ludojn kaj bezonas koni ĉiujn detalojn pri premioj, kaj kondiĉojn pri sendado de manuskriptoj, bonvolu peti informojn al nia redakcio, enmetante unu respondkuponon.

POTENCO DE KAMPOJ.

Fierajn urbojn laŭde mi admiras
 El ŝtono konstruitajn kaj el fer',
 Sed la animon ili ne altiras—
 Ĝin tenas sorĉoj de la ter'

Al turoj, arkoj, katedraloj—gloro!
 Al monumentoj de pasinta viv'.
 Sed logas min de pinoj bonodoro,
 De oraj kampoj perspektiv'.

Sed logas min, ĵetanta en sekalon
 La flavajn rozojn, fajra sunsubir',
 Kaj stela nokt', naskanta najtingalon,
 Tremado, revoj, amdezir'.

OLEG PAN.

Trad. el la rusa: IVAN LUBJANOVSKIJ

LA MILITISTO MARSALANA.

I

El iu ajn ni venis lando,
 memvolbataletontoj mil,
 Garibaldi'a je l' komando,
 de l' unuigo la venkil'.
 En ebenaĵo iam sola,
 mi vidis stari kontraŭ mi
 dudekjarulon; ne memvola
 reĝuniforma estis li.
 Pafil' minacis min malame.
 Li rajtis, min pretigis mi.
 Kvar paŝojn faris li, mi same;
 pli bone celis mi ol li.
 Ho! malbeniĝu la milito
 fipafiganta tiel nin!
 Pleniĝu la kaliko
 de la Marsala vin'!

I I

Vundita li duonturniĝis.
 Min kiel do maltrafis li?
 Ve! kiom pala li vidiĝis!
 Al li ekrapidegis mi.
 Mi venkokanton ne sonigis,
 sed pardonpetis je l' Ĉiel'.
 La soifantan mi trinkigis,
 malplenegiĝis la botel'.
 Ĉe arbon poste lin apogis
 mi kaj mortŝviton viŝis for;
 la frunto jam marmorodoris
 kaj nur batetis lia kor'.
 Ho! malbeniĝu la milito
 fipafiganta tiel nin!
 Pleniĝu la kaliko
 de la Marsala vin'!

I I I

La vundon bandaĝonte, levis
 la blankan uniformon mi.
 Pri resanigo dum mi revis,
 min ve! senesperigis li.
 Portreton sub la draptuniko
 mi vidis en silkaĵo-pec':
 Bonvesta jen maljunulino
 min alridetis kun dolĉec'.
 Iel mi poste mian sorton
 suferis, kaj suferos ĝin
 vidante de l' junul' la morton
 kaj ploron de la bonulin'.
 Ho! malbeniĝu la milito
 fipafiganta tiel nin!
 Foriĝu la kaliko!
 Marsalo naskis lin.

Teksto kaj muziko de G. NADAUD.

Trad. el la franca: ED. JUNG.

UNIVERSALA TERMINOLOGIO DE LA ARKITEKTURO

(*Arkeologio, Arto, Konstruo k. Metio*). — *Kun 2000 desegnoj.* — *Presejo Chulilla y Angel.* — *Madrid.* — *Aŭtoro: Francisko Azorín, arkitekto.*

Nia kordova samideano kaj amiko, nuntempe deputito al Konstitucia Parlamento de la Hispana Respubliko kaj vic-prezidanto de la Komisiono por la budĝetoj de la Centra Registaro, S-ro. F. Azorín, entreprenis plej belan verkon por Esperanto. Kontraŭflanke ni aperigas ekzemplon de paĝo de tiu vortaro. Tiu paĝo ne estas escepta. Ĉiuj vortoj de la vortaro, kiuj tion permesas, estas difinitaj, etimologie klarigitaj, plurlingve tradukitaj kaj kliŝe ilustritaj.

La difinoj estas klaraj, korektaj kaj bonstilaj en Esperanto. La desegnoj estas trafaj. La tradukoj, bonaj, de kunlaborantoj el kiuj la ĉefaj estas la portugalo Francisko Costa, direktoro de la revuo "Arquitectura", Lisboa; la italo Bruno Canattieri, arkitekto, Parma; la franco Ch. Tiard, inĝeniero, Paris, kaj la germano Joseph Berger, la verkisto, nia malnova amiko, nia premiito de la Floraj Ludoj.

En la prologo nia kara Azorín diras: "La laboro, mi deklaras ke en ĉi sciobranĉo estas pli facila ol en iu alia". Tiu deklaro honoras la aŭtoron kaj tute ne malpliigas la grandan meriton de la verkisto, kiu bonege konceptis kaj belreale efektivigas la taskon. Kontraŭe eksterordinara morala kvalito estas deklaro pri facileco de propra verko; ĝenerale eĉ plej modestaj laboruloj emas supozigi ke ili plenumas malfacilan taskon.

Gratulon al Francisko Azorín pro lia bonega esperantaĵo, plej konvinka argumento kaj varbilo por granda nombro da sciencistoj; kaj pro lia morala ekzemplo efektivigi ĝin tiel bone kiel senparade.

Delfi DALMAU.


laboristoj, k. c., loĝantaj ĉiuj en sama establejo.

Kanvaso.—El l. cannabis (kanabo).

- h.—cañamazo.
- p.—canhamaço.
- i.—canovaccio.
- f.—canevas.
- a.—canvas.
- g.—Kanevas.
- pol.—kanwa.

Lina au kanaba tolo, larĝmaŝe teksita, sur kiu oni faras brodaĵon aŭ punton.—aĵo.

Kaolino.—El ĉina kao-ling (alta monto).



Hemia formulo de la kaolino.

- h.—caolín.
- p.—caolim, kaolino.
- i.—caolino.
- f.—kaolin.
- a.—kaolin.
- g.—Kaolin.
- r.—kaolin.


Tre blanka argilo uzata por fabriki porcelanon.

Kapelo.—L. capella, el cappa (mantelo), ĉar en la unua, franca, oni konservis tiun de Sankta Marteno


- h.—capilla.
- p.—capélla.
- i.—cappella.
- f.—chappelle.
- a.—chapel.
- g.—Kapelle.
- pol.—papela.
- r.—kapella.

Malgranda religiejo aneksa al pli granda konstruaĵo.

Kapitelo.—Gr. kepale; l. capitellum, el kaput (kapo).



- h.—capitel.
- p.—capitel.
- i.—capitello.
- f.—chapiteau
- a.—capital.
- g.—Kapitell.
- pol.—kapitel.
- kapitel.



Plivastigita supro de kolono, ofte bele skulptita. Kubo—, konoida—, sferoida—, piramdia—, lotusa—, egipta—, dorika—, jonika—, korinta—, komposita—, romanika—, gotika—, araba—, bizanca—...

Kapitolo.—L. capitolium, propronomo de roma monto, el caput (kapo).

h.—capitolio.

p.—capitolio.

i.—capitolio, campidoglio.

f.—capitole

a.—capitol.



Kapitolo de Vasingtono (USN.).

—Kapitol.

r.—kapitolij.

Antikva citadelo de Romo. Majesta, alte starigita edifiko.

LA XXIV^a. EN PARIZO

KONGRESA KOMENTARO

G. Warnier

La prezidinto de la L. K. K. estas ĉarma paroladulo per Esperanto, kaj lerta prezidulo. Li bonege impresis al la parizaj aŭtoritatoj kaj al la esperantista kongresanaro. Lia edzino estis inda kunulino, inda kunlaborulino de tia prezidinto.

* * *

"Literatura Mondo"

La literaturmondanoj aktive partoprenis la Kongreson. Kelkaj kongresanoj opinias ke ilia partopreno estis pli aktiva ol literatura.

* * *

Politiko

La sensacia noto de la XXIV^a. estas disŝiro de la Kontrakto de Helsinki. La unuecigo de kotizo ŝajnas simpla vojo al venko de unu organiza spirito kontraŭ alia organiza spirito, de unu politiko kontraŭ alia en nia ĝenerala kaj centra movado. Sed la politiko de Esperantujo ne estas lingva afero. Ĝi povas esti, sendepende de Esperanto, politiko pli malpli fidela al la interna ideo kaj al la principoj de Homaranismo.

* * *

Perfektigeblo de U. E. A.

Ĉio homa en la mondo estas perfektigebla, ĉar eraro estas interhome ne evitebla, kaj nobla celo kaj certa eblo estas al komprenado spertado, lernado kaj malpliigo de eraro. Do U. E. A. estas perfektigebla, ĉefe pri akurateco kaj amplekso de respondado al delegitoj kaj ceteraj kunlaborantoj de la Asocio, eĉ kiam ili ne nur skribas pri pago de kotizoj. La delegitoj de U. E. A. estas eble la vera granda armeo de la pacaj batalantoj de Esperantujo, kaj ili meritas grandan atenton ĉu por ĉu kontraŭ.

* * *

Politiko de U. E. A.

U. E. A. estas por ĉiuj membroj vera Esperantujo sen politiko nacie sentebla aŭ maloportuna. U. E. A. estas la plej fidele neŭtrala Esperanto-asocio. Flandroj kaj valonoj, katalunoj kaj hispanlingvanoj ĉiam sentis sin oportune, libere, juste, amike, en U. E. A.

* * *

Politiko de K. R. — I. C. K.

K. R. ne sukcesis eviti maloportunaĵojn inter siaj membroj. Antaŭ kelkaj jaroj, la reprezentanto de la Kataluna Federacio rajtis saluti la Universalan Kongreson en la oficiala malfermo, eĉ

kontraŭ opozicia pretendo de reprezentanto de hispanlingva asocio. Ĉi-jare, kiam ĉiuj reprezentantoj de Esperanto-asocioj en la Hispana Respubliko harmoniis, dank' al konprenemo de niaj karaj samideanoj Piñó, Escartín, Azorín, la reprezentanto de la katalunlingvaj esperantistoj ne rajtis, laŭ la nuna vidpunkto de K. R. aŭ de I. C. K. Ankaŭ tial ne rajtis reprezentanto de la Flandra Ligo. Tamen rajtis reprezentanto de germanlingvaj esperantistoj en Ĉekoslovakujo. Fakte la Kontrakto de Helsinki estis disŝirita antaŭ la XXIV^a, ĉar ĝi ne regis jam dum la malfermo de la Pariza Kongreso, malgraŭ publikigo de la kongresa regularo en la kongreslibro. Protestis flandroj, protestis katalunoj, kaj ektimis la sudgermanoj, kiam ĉi-tiuj sciigis pri la maljustaĵo kontraŭ la unuaj.

* * *

Politiko de Esperantujo

Multaj malgrandaj kaŭzoj ekzistis por la nuligo de la Kontrakto de Helsinki, kiu kunordigis kaj rilatigis U. E. A. kaj K. R. per I. C. K. Sed unu granda kaŭzo de tiu disŝiro estas, laŭ nia opinio, diferenca *spirito* inter la *ŝtatanoj* kaj la *nacianoj* en Esperantujo. Nacioj estas *naturaj* diferencoj inter homoj. Ŝtatoj estas *politikaj* diferencoj. Tiuj esperantistoj pensas kaj sentas ke Esperanto estas solvo super naturaj *lingvoj* aŭ *nacioj*. La aliaj esperantistoj pensas ke Esperanto estas solvo super *ŝtatoj*. Tiuj ĉefe rekonas interlingvan bazon de Esperantujo, dum la aliaj ĉefe rekonas interŝtatan bazon. Ni, la katalunoj, la katalunlingvanoj, kies lingvo ne estas ŝtata aŭ imperia, sed apenaŭ oficiale rekonata kiel nacia, nin sentas proksime de tiu polo, de tiu hebreo, kiu sentegis la maljustecon lingvan kaj nacian kontraŭ superrego de la imperiaj antaŭmilitaj Germanujo, Austrujo kaj Rusujo. Tiu polo, tiu judo eksentis, kaj elsentis Esperanton. Liaj paroladoj kaj doktrinoj allogas nin. En la profundo de nia koro ni estas Zamenhofaj esperantistoj.

* * *

Superstiĉo pri "oficialeco"

Esperanto kiel lingva afero nur devas posedi *oficialan lingvan* institucion. Esperantujo, popolo esperantista, popolo kiu uzas Esperanton, laŭ difino pri *esperantisto*, nur devas posedi oficialan lingvon. La esperantista popolo povas ankaŭ posedi *oficialajn* propagandajn kaj organizajn instituciojn, sed estas pli utila al la movado, vigla ne oficiala ĵurnalo kiel "Heroldo de Esperanto", kaj vigla ne oficiala Universala Esperanto-Asocio, ol malvigla oficiala ĵurnalo, kaj malvigla oficiala Universala Esperanto-Asocio. Cent, mil neoficialaj asocioj disvastigantaj la oficialan Zamenhofan lingvon rapide en ĉiuj fakoj kaj rondoj en la homaro multe pli efikus por Esperanto ol oficialaj institucioj por diskutado inter esperantistoj aŭ pioniroj.

D. D.

Niaj flandraj amikoj, kiuj estis pli antaŭvidemaj ol ni, lo katalunoj, disdonis dum la Pariza Kongreso la ĉi-supre represatan Saluton.

Ĉu ni, la katalunoj, devos estonte uzi tiun ĉi specialan procedon por aŭdigi nian voĉon ĉe la Universalaj Esperanto-Kongresoj, malgraŭ nia miljara nacia lingvo kaj nia ĵus rekonkerita libereco?

Ni esperas, ke la nova organizo de la esperanta movado forpelos la rigidan protokolon ĉe la Universalaj Kongresoj, kaj oni evitos la ĉiujarajn plendojn de la malgrandaj "neoficialaj" nacioj.

Ne estas necese havi vastan klarvidecon por kunrilatigi la malpermesitan saluton de la Flandroj en Parizo kun tiu de la ukrainoj en Krakovo, pasintjare. Tamen, kio surprizis nin estas, ke oni malpermesis saluti la Kongreson al nia delegito S-ro. Dalmau.

Ni volas malkaŝe diri tie ĉi, ke ripetado de tiu neatendita spektaklo donus al ni pravigitan okazon por alpreni iom akran sintenon kontraŭ la ĉefdirektantoj de nia "neutrala" esperanto-movado.

(noto de La Redakcio)

ESTIMATAJ GEKONGRESANOJ,

"Flandra Ligo Esperantista" komisiis al mi saluti la nunan XXIV-an Universalan Kongreson de Esperanto nome de mia patrolando Flandrujo, malgranda laŭ teritoria, sed grandega laŭ historia kaj arta vidpunktoj. Mi salutas vin nome de la idoj de Rubens, Van Dyck, Jordaens, nome de la reviviĝanta Flandrujo, iam arta, komerca kaj civilizacia centro de Eŭropo.

Mi salutas vin speciale nome de 200.000 pilgrimantoj, kiuj ĉiujare kunvenas apud la Flandra Izermonumento sur la iama batalkampoj, por solene ĵuri: "Neniam plu milito".

Mi salutas vin nome de la Flandraj turistoj, kiuj nun per kurso en sia organo eklernas milope nian karan lingvon, dank' al klopodoj de Flandra Ligo Esperantista.

Mi salutas vin nome de l' pacama, liber- kaj laborema Flandra popolo, kiu deziregas liberecon al ĉiuj, fratecon inter la popoloj kaj baldaŭan finvenkon de nia Esperanto-movado.

Vivu la mondpaco!

Vivu Esperanto!

GESAMIDEANOJ,

Ĉar ni timis, ke estus malpermesate al nia delegito saluti la kongreson kaj li estus humiligata same kiel iam la Kataluna kaj la Ukraina delegitoj, ni decidis presigi kaj disdoni lo ĉi supran saluton.

Gesamideanoj,

Ofte aŭdiĝas plendoj pri societoj starantaj ekster la oficiala movado. Aliflanke la gvidantoj de la "Konstanta Reprezentanta-

ro", pro anti-demokratiaj kialoj, kiujn malaprobis la plimulto de la Esperantistaro, klopodas malpermesigi al ni nian aliĝon.

Unuiĝu por racia reorganizado! Forestas la tempo, dum kiu oni sukcesis sufokigi la voĉon de l' juna Esperantujo!

La ĉefredaktoro de "Heroldo de Esperanto" trafe skizis la sintezon:

"Konservi la taŭgan - forjeti la superfluan!

Malpli da paragrafoj, pli multe da fido!

Kaj pli multe da pozitiva laboro!".

Por "Flandra Ligo Esperantista": La sekretario, G. Debrouwere.—La prezidanto, L. Calloens.

BIBLIOGRAFIO

La Tajdo, de N. Hohlov. Liriko. Eldonis: "Heroldo de Esperanto", Koln (Germanujo).

Tiu 64-paĝa libreto, kun portreto de la aŭtoro, aperinta en 1928, enhavas belegajn originalajn poemojn de nia rusa samideano Nikolao Hohlov, unu el la plej grandaj inteligentoj en Esperantujo.

Hohlov staras sur la sama nivelo de la pli konataj poetoj Kalocsay kaj Baghy, kaj eĉ superas ilin en forma perfekteco. Ja la poezia arto de Hohlov estas klasika.

Moto de Verlaine: "De la musique, avant toute chose...", prenita sur la unua paĝo de la libro, esperigas ke la versaĵoj sekvontaj estos vere muzikaj. Certe ili estas tiaj, kaj, plie, enhavoplenaj, tio estas, vere inspiritaj kaj kortuŝaj, agrablaj por la koro, ne nur por la orelo... Belegaj estas la poemoj: Prolegomeno, Plendo, Mia vojo, Eŭropo, Karnavala Romanco, Nia lingvo.

Eŭgeno Onegin, de A. S. Puŝkin. Romano en versoj, el la rusa lingvo tradukis kaj komentis N. V. Nekrasov. Eldonis: Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris-Leipzig-Moskva, 1931. Kartonita volumo, 235-paĝa.

Giganta verko estas tiu ĉi versa traduko de unu el la plej bonaj kreaĵoj de la granda rusa poeto. Multaj sentos surprizon, vidante, ke, en la nuna proza tempo, en Sovetio oni tradukas kaj eldonas kompletan verkon de Puŝkin. Oni ne povos diri, ke niaj rusaj kamaradoj faras nur eldonojn celantajn proselitismon. Kvankam mi pensas, ke, antaŭ Eŭgeno Onegin, multaj fariĝos adeptoj de la Arta vigleco en la Sovetia vivo...

Nekrasov, jam bone konata, per la dirita traduko altiĝas ĝis la nivelo de Zamenhof, Grabowski, Kalocsay, tradukintoj de "Ifigenio en Taŭrido", "Sinjoro Tadeo", "La Tragedio de l' Homo", Kia rimriĉeco, kaj kia lerteco en la tradukado! Multegajn strofojn konsistantajn el 14 naŭsilabaj versoj laŭ tute propra formo, devis

rekrei la tradukinto. Kaj preskaŭ ĉiam la traduko estas flua, facile legebla. Tre valoraj estas ankaŭ la "Antaŭparolo", longe pri-traktanta la vivon de la rusa nacia poeto, kaj la "komentario", kun ne pli ol 285 notoj, kiuj komprenigas, ĉefe al alilandanoj ne konantaj la rusan vivon, ĉiun detalon de la romano.

En "Onegin" oni vidas poezie reproduktitan bildon de la rusa socio, prenita dum unu el la plej interesaj momentoj de ĝia evoluo. Puŝkin verkis ĝin en la jaroj 1823-1830 kaj ĉiuj ideoj de tiu epoko estas brile respegulitaj en objektiva kaj kritika maniero.

Por doni ideon pri la formo de "Eŭgeno Onegin" kaj pri la lerteco de ĝia tradukinto, ni transkribas unu strofon:

Scivolon vian okupinte
per lastmoda tualet',
priskribi dece ĝin kaj inde
al vi mi povus tuj en pret';
kuraĝa estus tio certe,
kaj mi priskribi povas lerte,
sed *pantalono, frak, jaket'*
en rusa mankas dialekt';
kaj vidas mi kaj pardonpetas,
ke eĉ sen tiu ĉi babil'
malriĉa mia lingva stil'
per fremdaj vortoj abundetas,
eĉ kvankam helpis min en kon'
l'Akademia leksikon'.

Resume, la romano "Eŭgeno Onegin" estas vervoplena, kaj la traduko tre trafa.

Nobela peko, de Mihail Sadoveanu. El la rumana originalo trad. Tiberio Morariu. Eld.: Ferdinand Hirth & Sohn, Leipzig, 1929. Volumo 21. de la kolekto "Internacia Mondliteraturo", kun 64 paĝoj.

Tiu ĉi volumeto enhavas belegan tradukon de tri rumanaj prozaĵoj. La unua: *Nobela peko*, estas rimarkinda pro sia emocio kaj poezieco. Morariu certe estas unu el niaj plej bonaj tradukintoj.

Esperanto, the International language, helps you make Friends with the World! Ilustrita propagandilo, grandformata, eldonita de la Usona Nacia Sekretario de U. E. A., en kvanto de 30.000 ekzempleroj.

Ĝi enhavas propagandan tekston en angla lingvo, faksimilon de la kovrilo de multaj Esperantaj gvidlibroj kaj fotografajon de aro de la plej gravaj libroj en la internacia lingvo. Inter la gvidlibroj, estas tiu pri Vic, aperinta okaze de nia kataluna kongreso, kaj inter la libroj estas la "Kataluna Antologio".

La iniciatinto, Sro. D. E. Parrish, meritas dankon kaj gratulon pro la ideo prezenti nian aferon en alloga kaj konvinka ma-

niero. Temas pri grandsfila, digna reklamilo, komparinda kun la altgrada komerca reklamo, tiom uzata en Usono.

Vere la naciaj societoj devus eldoni similan propagandilon, kvankam la kostoj estus altaj. Oni sin turnu al Sro. D. E. Parrish, 109, Fordham Drive, Buffalo (N. Y.), Usono.

Dudekdua Universala Kongreso de Esperanto (Oxford, 2-9 Aŭgusto 1930). Oficiala dokumentaro esperantista. I. C. K. de la E. M. Genève (Svisujo).

Volumo 140-paĝa, konsistanta el: I. Oficiala protokolo, Raporto kaj Statistikoj. II. Raportaro de la oficialaj institucioj al la Kongreso.

Dudektria Universala Kongreso de Esperanto, Kraków, 1-8 Aŭgusto 1931. Eldonis I. C. K., Genève, 1931.

Libro 124-paĝa, apartenanta al la Oficiala Dokumentaro Esperantista. Ĝi konsistas el: I. Oficiala protokolo, raporto kaj statistikoj. II. Raportaro de la oficialaj institucioj.

BES-a adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj, 9-a eldono, 1931. Bohema Esperanto-Servo, Potstejn, Ĉeĥoslovakujo.

Broŝuro kun pli ol 100 paĝoj. Ĝi enhavas multajn adresojn de samideanoj el Hispanujo.

Ovningsbok till elementarkurs i esperanto, Ekzercada libro por elementa kurso en Esperanto. Ellaborita de Sam. Jansson. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, Svedujo. Prezo sved. kr. 0'50.

La libro kompletigas la sukcesplenan kurson porkorespondan de Sveda Esperanto-Federacio, al kiu sin anoneis dum la lasta aŭtuno du mil partoprenantoj. Krome la libro estas uzota en la radiolecionoj esperantaj, kiuj okazos la unuan dimanĉon en ĉiu monato.

Llibre del "Liceu Dalmau". Katalunlingva eldonaĵo sur luksa papero, kun 100 paĝoj, pri instruoj kiujn oni donas en la moderna "Liceu Dalmau", kies fondinto kaj direktoro estas nia malnova samideano Delfí Dalmau. Kompreneble en tiu "Liceo" oni ankaŭ instruas Esperanton, persone kaj per korespondado. Krom multaj interesaj sugestoj de diversnaciaj verkistoj kaj pedagogoj, tiu libro enhavas kompletan katalunan tradukon de "Karaktero", de J. M. Van Stipriaan Luiscius, el la nederlanda tradukita en la esperantan de H. J. Bultuis, kaj poste tradukita katalunen de Delfí Dalmau.

Adreslibroj de Pollandaj esperantistoj kaj Praktika Informilo Pri-Esperanta. Prilaboris: Jan Zawada, Warszawa, 1931. En lingvoj pola kaj Esperanta. Ĝi enhavas la adreson de 4060 polaj esperantistoj Ducentpaĝa volumo, kun abunda teksto.

Nyckel till Esperanto. Sveda ŝlosilo. Eldonita laŭ plano de I. C. K. de la Esperanto-Movado en Genève.

J. G. C.

ENLANDA KRONIKO

Barcelona.—La esperanta societo "Juneco" elektis novan estraron, kiu konsistas el la jenaj samideanoj: Prezidanto, Jozefo Santulària; sekretario, Rafaelo Gisbert; kasisto, Johano Fayos; kalkulisto, Emanuelo Cervera; bibliotekisto, Andreo Ronsó; voĉdonantoj, Johano Farell kaj Jako Gimeno.

—Ce "Ateneu Enciclopèdic Popular" okazis la 2-an de Aŭgusto interesa parolado de Sro. Delfí Dalmau pri la pasinta esperanto-kongreso de Parizo. Tiu parolado altiris multajn samideanojn, kiuj deziris koni plej detale ĉion, kio okazis dum la kunsidoj de tiu Kongreso.

Sro. Dalmau klare kaj koncize konigis la decidojn prenitajn en Parizo pri la nova strukturo de la centra movado esperantista, kaj ĉe la fino de la disertacio, la aŭdantaro ĝuis kelkajn afablajn salutvortojn de nederlanda samideanino, kiu vizitis Barcelonon dank'al interesiga parolado kun lumbildoj pri Barcelono, kiun faris en Arnhem Sro. Delmau.

—Kelkaj gravaj kulturaj societoj de Barcelono, enmetis, ĉe la fremdlingvaj instruprogramoj, plenan kurson de Esperanto. Elstaras, pro la rimarkinda propagando per afiŝoj, la teknika akademio por laboristoj "Polytechnicum", kie la sekretario de K. E. F. Sro. Josep Alberich klarigos esperanto-kurson.

Ripoll.—Kelkaj esperantistoj vigle propagandas por Esperanto en tiu historia kataluna urbo. Sur gazeto "Clam Popular" ofte aperas poresperantaj artikoloj, dank'al la fervoreco de niaj samideanoj Estivill, Mauri kaj f-ino. Casadesús.

Cassà de la Selva.—*Nova Zamenhof-strato*. La 18-an de Septembro estis solene inaŭgurata la strato "Doktoro Zamenhof" (antaŭe Carrer Nou) antaŭ la ĉeesto de la urbestro kaj ĉiuj urbkonsilantoj de Cassà. Partoprenis la feston multaj esperantistoj el Girona, kiuj kune kun la ĉi-tieaj esperantistoj formis rimarkindan demonstracion. Estis dediĉataj al la Majstro kelkaj rememorigaj paroladoj, kiuj multe interesigis la neesperantistan publikon.

XXV-JARA JUBILEO DE LA GRUPO "PACO KAJ AMO"

La konata grupo de Barcelono aranĝis deversajn festojn por honorigi sian arĝentjubilean daton. La 15-an de Oktobro estos inaŭgura vespero kun kelkaj paroladoj de la plej konataj pioneroj. La 16-an okazos teatra reprezentado, kaj oni ludos esperantan teatraĵon. La 23-an oni finos la ciklon de festoj per kunfrata festeno ĉe la Restoracio Rectorat de Les Planes. Prezo de la manĝbileto, 9 pesetoj. Petu informojn al la grupo, ĝis la 16-a de Oktobro, strato Planeta, 16 (Gràcia).

Eesperantistes de parla catalana:

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

Federació Esperantista Catalana

i a la vegada feu-vos abonat del seu òrgan oficial

Kataluna Esperantisto

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota:
1'80 pessetes a l'any els federats que pertanyin a un grup esperantista organitzat.

3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

Subscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.

Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espla. Catalana:

Carrer València, 245. - - Barcelona

«Almenys per patriotisme els esperantistes
«catalans haurien de subscriure's a l'única re-
«vista *internacional* que es publica a casa nostra:»

Espero Katolika

Demaneu números de mostra a l'Administració:

COLLEL (per Girona)

JAUME GRAU CASAS

SANT QUINTÍ DE MEDIONA (Katalunujo)

Vendas sian Esperanto - Bibliotekon,
konsistantan el
400 volumoj

Estas interesaj novaĵoj kaj malnovaĵoj. Inter la lastaj, plena kolekto de "LA REVUO". (Ok binditaj volumoj).

Interesatoj petu prezojn!